

Nova Rubriko : **ILEI kaj UNESKO**

Tiu rubriko aperos ekde nun en ĉiu numero de IPR.

Instigas min la artikolo de Ron GLOSSOP en IPR 2014/3 paĝo 14

Faktoj :

1977 : La tiama Ĝenerala Direktoro de Unesko Sinjoro Amadou Mahrar M'Bow partoprenis UK-on en Rejkjaviko, Islando

2008 : Niaj delegitoj ĉe Unesko Monique Arnaud kaj Jean-Pierre Boulet oficiale transdonas al Unesko verketon pri « Tarofolio », vitaminriĉa planto. Tiu libreto estis verkita en laborgrupo okaze de ILEI-Konferenco en Porto Novo, Benino, en 2008.

2010 : Mi povis paroli kun eks-Ĝenerala Direktoro de Unesko Sinjoro Federico Mayor en Oslo, Norvegio, okaze de kongreso pri paco por celebri la centan datrevenon de Nobel-Pacpremio por « International Peace Bureau ». Mayor reagis pozitive al mia mencio de Esperanto.

2014 : Nuntempa Ĝenerala Direktorino Irina Bokova permesas (aŭ postulas), ke sur la oficiala retejo www.unesco.org ŝia parolado por la tago de la gepatra lingvo (21an de februaro) aperu en ŝia lingvo la bulgara, en Esperanto kaj en la 6 laborlingvoj de Unesko.

Regule aperas en Parizo niaj delegitoj ; ili rajtas partopreni la kunsidojn kiel observantoj.

« Denove nun ekzistas tre bona rilato inter Esperanto kaj Unesko. » Tiel finiĝas la esperplena teksto de Ron Glossop.

Instigas min la interparolado kun Sinjorino Colombo en la sidejo de Unesko en Parizo la 6an de oktobro 2014. Mi iris al Unesko por esplori, kiel ILEI povus, povos reakiri ian kunlaboran statuson kun tiu tutmonda institucio. Ŝi informis min, ke iu kandidato nepre trovu iajn eblojn kunlabori kun Unesko, kaj tiuj kunlaboroj (kun raportoj kaj pruvoj) devas aperi en la kandidatiĝa dokumento. Sen kelkaj tiaj kunlaboroj la oficistoj de Unesko eĉ ne rigardas la dokumenton... Mi devos plu esplori, kiel tiaj kunlaboroj povas aspekti, pri kio temas ekzakte. Poste mi povos informi ĉiujn niajn membrojn, ĉiujn niajn sekciojn.

Jam nun mi povas mencii kaj gratuli Kubo-n kaj RD Kongo-n. Tiuj du Landaj Asocioj de UEA jam sukcesis atingi agnoskon de sia nacia Unesko Komisiono. Sekvenda ekzemplo.

Ni devas ekkoni la jarmilajn celojn de Unuiĝintaj Nacioj, ni devas ekkoni la agadojn de Unesko kaj labori paralele, samcele. Farante tion, ni devas akiri pruvojn, per fotoj, gazetaj artikoloj, kunlaboro kun lokaj instancoj oficialaj.

En ĉiu lando esperantistoj esploru pri kontaktoj, rilatoj, agnosko fare de la nacia Unesko Komisiono.

Unue montri intereson, ekkoni, kunlabori. Poste submeti kandidatiĝon. Fine falos decido de la Ĝenerala Direktorino Irina Bokova. Ni provu !

Mireille Grosjean

Prez de ILEI